# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 05/05/2022 Kvincentokdekunua eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*


*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 736,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas 300,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas 178,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas 156,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas 102,000 lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2022 ??)

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondas pri via sano, do portu maskojn.

Ĉu kapitulaco ne povas savi viajn vivojn, familiojn, domojn, urbojn, dignojn ktp *Roger Springer*



la esperanta retradio

Donas Bonan Cirkaŭ-5 Minutan Aŭskultadon kaj Legadon Ĉiun Tagon.



GENTEKNIKO POVAS CERTIGI RIKOLTOJN DE NUTRAĴOJ 30A APRILO

(*Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*)

**EKSTRAĴOJ POR LECIONOJ DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard). Numero 13 de "Por Progresantoj".**



GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Kiuj estas la dek-ses reguloj de la Esperanto-gramatiko? (Menciu nur parkere!).

2). Menciu almenaŭ kvin gramatikajn Esperantajn regulojn kiuj ne troviĝas en la dek-ses reguloj.

3). Ĉu ankaŭ sola radiko, aŭ nur vorto kun finaĵo havas signifon?

4). Nomu almenaŭ kvin Esperantajn subjunkciojn (= subordinating conjunctions).

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 581. *Marcel Leereveld.*

## MILITOJ ESTAS KRIMOJ KONTRAŬ HOMOJ, BESTOJ KAJ NATURO



Ĉu vi remarkas ke ĉiuj grandaj politikaj partioj ne subtenas pacon?

Ĉar la plej grava celo de ĉiu polikisto estas ne perdi sian postenon.

La okcidenta medio kontrolas la informon al la popolo.

Usono kontrolas la mondan okcidentan medion.

https://www.greanvillepost.com/2022/04/27/all-search-engines-are-effectively-controlled-by-the-u-s-government/

Usono profitas el militoj. Por la vero sekvu la monon!

## Kiel oni povas voĉdoni kontraŭ la kurado al milito?

Nur la malgranda *Australian citizen party* subtenas amikecon anstataŭ milito. Citizens Party 2022 Federal Election Campaign

Alie voĉdonu por *Social Equality Party* sed la leĝo malpermesas ilin uzi la vorton "*socialist*"

Finfine voĉdonu por iuj sendependaj kandikatoj

Memoru la Ĉefministro sole povas ekigi militon kaj la venka partio elektos lin, ne vi

Nur la voĉdono por paco bezonegos ĉe la 2022 voĉdono

## Deka epizodo el la Vivo de Marcel (Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917



(10) Kiam mi aĝis nur kelkajn jarojn, miaj gepatroj kaj mi loĝis en strato en la sudoriento de Amsterdamo. Sed tie iu en la sama strato loĝanta juna virino, por prizorgi la luatan domon por sia patro kaj fratino kaj frato, komencis amindumi kun mia patro, en la butikoj. Ĉar tiel ŝi ne povis havi amon kaj sekson kun li, mia patro aĉetis ne plu ireblan karavaneton, metis ĝin en malgrandan vilaĝon, kaj mi kaj mia patrino loĝis tie dum la semajno, "pro plezuro", kaj mia patro venis tien por la semajnfino. Sed tio fariĝis suspektema, kaj mi devis kelkfoje kuniri kun la patro al lia laboro, kaj al la juna virino. Malpli juna mi komprenis la ialon. Kaj sen voli, mi aŭtomate rakontis al mia patrino la veron, ke dum tiuj vizitoj mi devis resti en la domo de la amantino kaj ŝi pasigis la tempon kun li en lia domo. Nek ŝi nek li volis ĉesigi tion, sed mia avino diskutis kun li ĉesigi, kaj li fine konsentis, por mia bonstato. Mia avino laboris forte por tiu sukceso. Miaj gepatroj post tio ekloĝis en la sama vilaĝeto Blaricum kun miaj geavoj, kiuj estis ĵus aĉetintaj tie malnovan farmon kaj celis kun mia patro ŝanĝi la bovinejon al granda loĝejo. Kaj tiutempe mia patro sukcesis ricevi permeson por mem instrui min anstataŭ sendi min al elementa lernejo. Cetere tio malsukcesis, ĉar mi preferis prizorgi legomĝardenon anstataŭ studi.

Malbonreputacie mi iufoje montris min nuda al la pasantaj infanoj, kio kaŭzis protestojn de la, cetere malriĉaj, najbaroj. Alifoje mia avino estis serioze atakata de hundo de la riĉa najbaro, kiu rifuzis helpi ŝin. *Marcel Leereveld*

## BES membro vizitis esperantistojn en Kanbera kafejo *Petro Danzer*



VIRUSA ATAKO (AE 580) Roĝero, via komputilo bezonas ekranmaskon!! 😂

*Vera Payne*

# MALSATEGOJ

Lastatempe mi legis libron de Amartya Sen, ekonomikisto, kiu memoras la grandan malsategon kiu okazis en Bengalio, Hindio, en 1943-4, kiam li estis knabo. Li studis ekonomian evoluigon kaj ellaboris teorion. Sen asertis ke malsategoj ne okazas en funkciantaj demokratioj ĉar ties estroj devas esti pli reagemaj al la postuloj de la civitanoj. Por ke la ekonomio kresku, li argumentis, sociaj reformoj—kiel plibonigoj en edukado kaj publika sano—devas antaŭi ekonomikan reformon.

Multegaj homoj mortis en Bengalio en 1943-4 ĉar la brita kolonia registaro ne agis sufiĉe por kontraŭi la problemojn, kaj ĝi malpermesis diskuti la aferon publike. Estis nur kiam iuj ĵurnalistoj finfine rifuzis plu silenti, ke la registaro embarasite agis kaj la malsatego finiĝis. Malsategoj ne okazas en Hindio post la demokratiigo en 1948.

La teorion pri sovetia socialismo Roger priskribis en AE 579 (Ĉu Publike Posedataj, Planitaj Ekonomioj Funkcias?), sed la praktiko estas alia afero. Multaj malsategoj okazis en Sovetio en la dudeka jarcento, ekzemple en 1921-4 kaj en 1933 en Ukraino kaj milionoj da homoj mortis. La plej multa mortokvanto okazis en Ĉinio en la Granda Salto Antaŭen en 1959-61, kiam mortis dekoj da milionoj da homoj.

WIKIPEDIA-ARTIKOLOJ PRI MALSATEGOJ

Malsatego

Malsategoj en Rusio kaj la Sovetunio

Famine

Theories of famines

Great Famine of 1876–1878

Bengal famine of 1943

*Donald Rogers*



# La nato/rusujo konflikto, la kovidviruso kaj klimataj ŝanĝoj

malebligis la normalajn plantadojn tra la mondo.
Sankcioj uzataj kiel armiloj, malebligas al movado de mono kaj varoj ĉirkaŭ la mondo.

La ŝtelado de centoj da multmilionaj dolaroj kiel puno mortigos nian monan sistemon.

Baldaŭ monhavantoj spertos altajn kostojn kaj la ne monhavantoj spertos mortmalsategojn
Kompreneble militoj ekflajros inter la havuloj kaj ne havuloj ĉar neniuj mortos pace.

Ĉu la ĉiama propagando kontraŭ Rusujo per la okcidenta medio kondiĉigas vin por la detruo de nia planedo? Kaj nun ankaŭ kontraŭ Cinujo?

## Voĉdonu por paco.

*Roger Springer* Esperantisto



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm je la unua kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 7a de majo estos la unua sabato Venu! *Roger Springer*

# SE VI VOLAS PACON LERNU ESPERANTON

Pardonon pro prokrasto por ĝisdatigi vin pri iniciatoj miaj cele al disvastigo de la lingvo Esperanto kaj esperantigo de bahaaj gejunuloj:

(1) Mia retejo-mastro eksiĝis kaj lia anstataŭanto fariĝis troŝarĝita de laboro. (2) Tiu ĉi sepdekjarulo serioze malsaniĝis pro melanomo en la kvara grado, kiu nun dank' al Dio, kaj post 3 operacietoj en kliniko kaj hospitalo, (angle: *'procedures under local anaesthetic*) iom pliboniĝas.

Dulingve aperis lastatempe por atentigi pri (a) lingva disigo en Ukrainio (b) la vera signifo de la vorto 'apokalipso' kaj kial la milito en Ukrainio estas nur "antaŭgusto de la ruiniĝo, kiun ĉi tiu konsumanta fajro faros sur la mondon?" https://www.bandeeducation.com/apokalipso-post-apokalipso

(c) kial la zamenhofa lingvo, kaj neniu alia lingvo, estas la primara servo por malhelpi militon kaj rasismon: ***LA MEMBROJ DE LA HOMO TREMU***

https://www.bandeeducation.com/the-limbs-of-mankind-to-quake-la-membroj-de-la-homo-tremi

Samloke legiĝas en ties 5 finaj etaj alineoj ke en 1891 Baha'u'llah esperantistiĝis kaj do same agos bahaaj junuloj:

Samteme do en la angla por helpi influhavajn bahaajn plenkreskulojn:
**https://www.bandeeducation.com/baha-u-llah-was-an esperantist**

'Se vi ne bremsas la manon de premanto, se vi malsukcesas gardi la rajtojn de la prematoj, kian rajton do vi havas fanfaroni inter homoj? Kio estas tio, pri kio vi povas prave fanfaroni?' **Baha'u'llah**, pr: Bahola (1817 - 1892), la Fondinto de la Bahaa Kredo



Amike *Paul Desailly*

**3ZZZ** En la elsendo de la 2a de majo 2022 eblas aŭdi pri iom de la historio de Esperanto - la franca periodo-, pri la konsekvencoj de granda konsumado de viando ,pri superstiĉo .

Aŭdeblas ankaŭ novaj kantoj



*Franciska Toubale*

# Parolis ŝafino al sia ido

“Panjo” diris ŝafino al sia amata patrino: “antaŭ mallonge la filineto de la bienisto ludis kun mi. Ŝi estas bonega, kaj mi estas certa, ke ŝi amas min. Mi devas konfesi, ke nun mi amas ĉiujn homojn. Ili amuzas min kaj ili eĉ tre ŝatas ludi kun mi!”

“Karega filino” respondis la ŝaĝa patrino. “Vi tute ne scias ion pri la naturo de la homoj! Unu momenton ili ludas kun vi, ili ĝojigas vin. Sed baldaŭ vi estos pli aĝa, kaj vi lernos la veron pri ili. Neniu el ili estas bona. Neniu el ili amas vin. Laŭ mia sperto la homoj estas la plej kruelaj el ĉiuj kreitaj de Dio. Estas vere, ke malgranda parto el ili estas iomete bonaj, sed ĝenerale, homoj ankoraŭ ne bonas. Vidu nur kiel ili traktas unu la aliajn. Ili ne amas unu la aliajn. Nur unu aferon ili amas. Tio estas mono. Ili ŝtelas unu de la alia. Ili kun grandega ĝojego mortigas unu la aliajn. Ili bombardas la malsanulejojn unu de la aliaj. Ili bombardas la lernejojn dum tiuj estas plenaj de geinstruistoj kaj infanoj. Ne, oni ne povas diri, ke ili estas bonaj. Homoj, kiuj amas mortigi unu la aliajn, ne estas bonaj. Kaj troviĝas, bedaŭrinde, ankaŭ homoj, kiuj malamas labori. Ili anstataŭ labori, devigas aliajn homojn labori, eĉ laboregi kaj transdoni la plej grandan parton de sia salajro al la tiel nomata registaro, kiu elspezas la monon aĉetante la kadavrojn de ĵusnaskitaj ŝafidoj kaj aliaj senkulpaj bestidoj. Sed ne nur tio. Ili ankaŭ mortigas unu la aliajn. Ne estas sciate, ĉu ili manĝaĉas unu la aliajn, esperebl ankoraŭ ne, sed ne surprizas nin, se tre baldaŭ ili faros ankaŭ tion.

Ili eĉ malamas unu la aliajn, kaj mensogas unu al la aliaj. Kredu min filino, ili estas la plej kruelaj el ĉiuj kreitaj de Dio. Dio diris: “ne mortigu”! Homoj mortigas. Ili kun granda ĝojo mortigas ĉiujn el ni, la sendefendaj bestoj. Kaj kun eĉ multe pli granda ĝojo ili mortigas ankaŭ unu la aliajn! Neniam kredu ke homoj estas amikemaj. Verŝajne kelkaj el ili estas, sed bedaŭrinde troviĝas iu grupo da homoj, kiuj neniam laboras, ili sidas kaj fumas cigarojn kaj drinkaĉas alkoholon la tutan tagon. Ili servas la Diablon kaj devigas aliajn homojn, multe pli bonajn ol si mem, eliri kaj mortigi ĉiujn, kiuj parolas aliajn lingvojn ol ili mem. Neniam kredu tiujn fihomaĉojn, ili ne amas iun ajn, ili amas nur sin mem!



*Bob Felby*

En ĉi tiu sperta mensoga mondo , mi ĉiam provas sekvi la monon por eble trovi la veron.
Ĉiam mi demandas min, kiu gajnas per la fia ago? Kaj ne ĉu homoj kapablis tiel fie agi.
Fakte ni estas nur peonoj por la regantoj de nia ne perfekta mondo. *Roger Springer*

"Oni kredas aferojn ĉar oni estis kondiĉita kredi ilin." — *Aldous Huxley, Brave New world*

# La manieroj kiel Rusujo uzas militforton

Kiom ajn nekredeble ŝajnas al tiuj, kiuj vivas ene de la Okcidenta Veziko, la rusoj estas pli civilizitaj kaj multe pli efikaj laŭ la manieroj kiel ili uzas militforton.

Gilbert Doctorow: The Russian Way of War – The Greanville Post *Roger Springer*